- turelles, la gestion des bénévoles,
- la mercatique,
- la gestion financière et l'acquisition de moyens financiers,
- les capacités de négociation.

Quentin Weber-Seban,  
coordonnateur du projet



### Et un autre partenariat éducatif Grundtvig !

**L**'association Eurokka a été retenue pour un partenariat éducatif Grundtvig avec 5 autres associations : Bjalistoka Esperanto-Societo (association coordonnatrice), Triesta Esperanto-Asocio, Verĉela Esperanto-Grupo, Skota Esperanto-Asocio et Esperanto-Klubo de Visaginas Asorti.

Le responsable pour Eurokka est Floréal Martorell, son président. Le thème du projet est « Du local au mondial : Les nouveaux défis du volontariat ».

Le projet prendra fin le 31 juillet 2015.

Les objectifs du projet sont de renforcer l'action locale par une ouverture sur l'international en développant la coopération, en partageant les bonnes pratiques et en organisant des stages de formation sur les outils informatiques, l'organisation d'événements locaux, le travail en

équipes interculturelles, l'organisation des bénévoles, l'autogestion des groupes (gestion du temps, motivation, prise de décision, résolution de problèmes), la gestion financière, la coopération avec les instances locales et éducatives.

Le premier séminaire (avec mobilités) a eu lieu du 25 au 29 octobre à Trieste dans le cadre des Journées Karstiques: Dropbox, google Hangouts, google doc, google, doodle, facebook... Voir : [www.tea1906.altervista.org/alterpages/files/ProgramoSeminario.pdf](http://www.tea1906.altervista.org/alterpages/files/ProgramoSeminario.pdf)

Les suivants se dérouleront à Toulouse en février 2014, en juin 2014 pendant le congrès écossais, en août-septembre 2014 à Visaginas (Lituanie) pour un festival, en décembre 2014 à Bialystok et en avril 2015 en Italie.

(info : Flo !)



## Universala Kongreso de Esperanto

# Lille2015, ek al la centa !



spektakla programo, infana kongreseto kaj junulara programo.

Vi povas informiĝi pri la centa UK kaj sekvi la novaĵojn vizitante la retejon [www.lille2015.fr](http://www.lille2015.fr) kaj la Facebook-paĝon [www.facebook.com/lille2015](http://www.facebook.com/lille2015)



Jam ĉ. 250 homoj ŝatas kaj abonas la Facebook-paĝon, ankaŭ vi ŝatu !

Vi povas rilati kun la organizanta trio por informo, ideo aŭ kontribuo :

**Retpoŝte :** [lille2015@lille2015.fr](mailto:lille2015@lille2015.fr)

**Poŝte :** **Espéranto-France/Lille2015, 4 bis rue de la Cerisaie, 75004 Paris, Francio**

**E**n 1905, la unua Universala Kongreso de Esperanto (UK) okazis en la nordfranca havenurbo Bulonjo-ĉe-Mar. De la 25a de julio ĝis la 1a de aŭgusto 2015, la centa UK okazos en la nordfranca ĉefurbo Lillo (Lille) !

Universala Esperanto-Asocio (UEA) decidis la urbon Lillo en marto 2013. Post tiam, la Landa Estraro de Espéranto-France ekhavis vicprezidanton pri la UK Lille2015, nome Xavier Dewidehem, kiun helpas Julia Hédoux kaj Michel Dechy. En septembro, la konstanta kongresa sekretario de UEA, Clay Magalhães, revizitis Lillon por labori kun la trio de Lille2015.

Komence de decembro kunsidos kunlaborantoj por konsistigi la Landan

Kongresan Komitaton (LKK). Jen komenciĝas la kongresa laboro. La helpon de ĉiuj oni bezonas ! Se vi deziras iel kontribui, kontaktu Lille2015 (vd. la ĉi-subajn adresojn) por indiki la fakon kaj la gradon de via kontribuo.

La centa UK disvolviĝos en la vasta kongresejo Lille Grand Palais proksime al la urbocentro. Ekskursoj varios inter esperantista historio kaj nordfranca turismo, tra kaj ekster la Lilla regiono kaj kompreneble aparte en Bulonjo-ĉe-Mar. Pri-laborotaj estas i.a. kultura kaj



## Appel aux bénévoles

**A**fin de commencer à constituer des équipes et d'anticiper sur les personnes que nous pourrions contacter en cas de besoin, nous vous invitons à remplir dès à présent le petit questionnaire ci-dessous qui n'engage à rien mais qui permettra de nous situer et de contacter les personnes en temps voulu. Merci !

### 1- À partir de quelle période pourriez-vous travailler sur ce projet ?

### 2- Quel genre de mission seriez-vous prêt à effectuer ?

- Exercer un poste à responsabilité
- Contribuer par des travaux d'organisation, de préparation, de rédaction, etc.
- Aider par un travail de « petites mains »

### 3- Dans quel domaine préféreriez-vous aider ?

- Accueil et orientation des congressistes
- Communication : grand public, contact avec les médias, distribution de supports d'information, etc.

- Communication : édition de supports, rédaction de bulletins d'information, etc.
- Excursions, avant et après congrès (organisation, guide, accompagnateur...)
- Finances
- Recherche de sponsors
- Programme Jeunes
- Programme Enfants
- Logement
- Programme de jour (réunions, conférences, ateliers...)
- Préparation des spectacles
- Soutien technique (son, lumière, préparation de salle...)
- Travail administratif (envois, préparation de documents, badges...)

## Interasocia kongreso

# Kongreso 2014 en Chambéry, inter montaroj kaj lagoj...

**C**hambéry estas la historia ĉefurbo de Savojo, sendependa ŝtato ĝis 1860 kaj la prefektejo de la samnoma departemento. Savojo kuŝas en Alpoj ĉe la landlimo kun Italio kaj proksime de Svislando, kio favoras la partoprenon de apudlandaj esperantistoj en la kongreso. La departementon kovras montaroj kaj trafluas du ĉefaj riveroj, Izero en la valo « Tarentaise » kaj Arko en la valo « Maurienne ». La plej granda natura lago en Francio – la lago Bourget – kuŝas apud Chambéry. La departemento famas mondscale pro sia « plej vasta skiebla kampo en la mondo » kaj la loĝantaro duobligas dum la kvin monatoj de la vintra sezono. La skiindustrio ĉefe lokita en la valoj estas la plej granda fonto de riĉeco. Ĝin sekvas metalindustrio dank'al la malmultekosta akvoenergio, agrikulturo kaj bankuracado. Savojo ankaŭ malfermiĝas al pli « milda » turismo dank'al admirindaj naturaj ejoj, lago Bourget kaj lago de Aiguebelette, la Nacia Parko Vanoise, la regionaj parkoj de la montaroj Bauges kaj Chartreuse, la famaj montpasejoj « Iseran », « Galibier » kaj « Petit Saint-Bernard », neforgeseblaj pejzaĝoj... Kvankam la naturo estas grave difektita pro la « blankora industrio » ĝi ankaŭ profitis de longa protekto. La Nacia Parko Vanoise estis la unua franca nacia parko kreita antaŭ kvindek jaroj, la lago Bourget kaj ties vivmedioj profitis ĉies atenton kaj agadon...

Dum la kongreso de Chambéry, ni proponos malkovri la regionon dank'al prezentado dum akcepta vespero kaj per ekskursita tago. Dum busveturo ĉirkaŭ la lago Bourget, vi admiros belegajn panoramojn, vi vizitos la abatejon « Hautecombe » superantan la profundajn



akvojn, vi manĝos borde de la kanalo « Savière » liganta la lagon al Rodano, vi traveturos la banurbon Aix-les-Bains. Se vi preferas piedmigradi, ni gvidos vin ĝis la montosupro « L'Épine » superanta Chambéry kaj la lagon kaj malsupreniros al la lago de Aiguebelette, kie vi povos gustumi specialaĵon, frititajn fiŝetojn. Aliaj povos ankaŭ paŝi de la urbo ĝis la domo de la ĝeneva verkisto, muzikisto kaj filozofo Jean-Jacques Rousseau kaj reveni tra fama parko kie staras arbo de Esperanto...

La kongresejo staras en la kvartalo Bissy, de kie oni povas facile atingi la stacidomon kaj la urbocentron per la komunaj transportiloj. Ni ne zorgos pri la tranoktado sed havigos liston de hoteloj.



Tamen ni proponos komunajn manĝojn en la kongresejo kondiĉe ke oni mendu la manĝojn sur la aliĝilo. Ni laŭeble proponos regionajn specialaĵojn.

La Rodanalpa Esperanto-Federacio elektis organizi preskaŭ lastminute la kongreson 2014, por senpezigi la francan esperantistaron en la perspektivo de Lille 2015. Certe se ni autaŭvidintus tion, ni farintus alimaniere. En nia federacio, ĉiam gravas organizi kongresojn ankaŭ malfermitajn al neesperanta publiko kaj kongresejo en la centro de la urbo estus pli trafa.

Tamen ni certigas al la partoprenantoj, ĉu francaj, ĉu alilandaj, tre agrablan amikecan kaj neforgeseblan travivaĵon.

Philippe Pellicier



## Komuniko de FEI

# Franca Esperanto-Instituto



**F** EI estas lingva institucio komuna al UFE kaj SAT-Amikaro, je la dispo de ĉiuj esperantistoj kaj esperantistaj organizoj en Francio.

Nia kunsido okazis la dimanĉon 6-an de oktobro en la sidejo de UFE.

Kiel anoncote, nia prezidanto de 2007, Klaŭdo Roux, ne renovigis sian kandidatiĝon por plia trijara mandat-periodo. Sin proponis por lin anstataŭi Vinko Markovo, kiu unuanime estis elektita.

Nun ni havas eĉ du vicprezidantinojn, Janine Dumoulin kaj Mirejo Grosjean.

La sekretario plu estas Ĵak Le Puil, la kasisto, Michel Dechy, la direktorino de la ekzamenoj, Anne Jausions (kun la helpo de la ceteraj membroj de la ekzamina centro: Janine Dumoulin, Vinko Markovo, Christian Rivière kaj Renée Triolle) kaj la respondeculo de la TTT-ejo, Pierre Dieumegard.

Ekde nun la studendaj verkoj por la Atesto pri Supera Lernado estas :

- *La fotoalbumo* de Trevor Steele,
  - *Ĉu vi konas Blaise Cendrars ?* de Manuel de Seabra,
  - *Kredu min Sinjorino* de Cezaro Rossetti,
  - *Ne ekzistas verdaj steloj* de Liven Dek.
- Sed antaŭ ĉio plej gravas instigi niajn kursgvidantojn puŝi siajn lernantojn al

La tarifo por la unuagrada ekzameno estas nur 10 eŭroj, kio ne devus esti obstaklo, ĉu ne ?

Cetere, la FEI-ekzamenoj taksas diversajn kapablojn, pri kiuj la nun popularaj KER-ekzamenoj tute ne okupiĝas, movada kulturo, pedagogio, tradukado, interpretado, uzo de Esperanto en turismo, scienco kaj tekniko. Do, ambaŭ ekzamen-sistemoj kompletigas sin reciproke.

Por pliaj informoj ne hezitu viziti nian TTT-ejon [www.franca-esperanto-instituto.net](http://www.franca-esperanto-instituto.net)



trapaso de ekzamenoj. Nur tiel la lernantoj kapablos taksii sian nivelon kaj havi emon al plia studado.



Ĵak Le Puil  
Sekretario

## Komuniko de JEFO

# Nova estraro de JEFO

**L**a nova estraro de JEFO (Espéranto-Jeunes) estis elektita en oktobro 2013 kun tre internaciema teamo.

Jen la estraranoj laŭ posteno :

- Prezidanto  
David Hauser (Paris, 75)
- Vic-prezidanto  
Alexandre Raymond (São Paulo, Brazilo)

- Kasisto  
Quentin Weber (Lille, 59)
- Sekretario  
Jérémie Bert (Montpellier, 34)
- Reprezentanto de JEFO ĉe TEJO  
Laetitia Bert (Montréal, Kanado)
- Reprezentanto de JEFO ĉe UFE  
Quentin Weber (Lille, 59)
- Reprezentanto de UFE ĉe JEFO  
Julia Hedoux (Boulogne-sur-Mer, 62)

## Raporto pri la junulara renkontiĝo

# FESTO !

**V**enonta haltejo “Aĥeno.” Mi eltrajniĝas el la Thalys-rapid-trajno el la Parizo. Jen mia unua paŝo en Germanio, akceptite de tri amikinoj. Mi bedaŭrinde malfruas, FESTO jam komenciĝis de kelkaj tagoj. Tamen mia unua ekskurso apartenas al la festivalo “off”, kiel oni diras en Avinjono. Nia kvaropo vizitas Aĥenon, la katedralon, la tesalonon... poste la turismoficejon (nature) kaj la multajn jam okupitajn parklokojn.

Post tiu neeltenebla suspenso, ni aŭtas al Belgio kaj mi finfine alvenas en Kelmiso, meze de Neŭtrala Moresneto, iama kaj nuna Amikejo. La verda flago ŝvebas super la festejo, sub “ĉiel’ tiel griza, ke pendumis sin kanalo”. Sed ĉi tie flirtas ne la spirito de Brel, pli sendube tiu de l’granda Zaza.

Fu ! Jes ! Mi finfine spertas mian unuan Esperanto-renkontiĝon. Konsentite, ne ĉe la alia flanko de l’ Tero, sed tamen en Esperantujo. Unue, munti la tendon. Laŭsente, mi kuraĝas kiel gerilano, preta alfronti la malvarmajn noktojn de somero en orienta Valonujo. Nu, mia kuraĝo baldaŭ ŝanceliĝos pro la temperaturo. Tamen mi ja postvivis, ne zorgu ! Dank’ al la varmiga etoso kompreneble kaj ankaŭ al kelkaj bieroj. Okazo por mi malkovri la stelojn. Mi ne plenigu bankuvon de tiu bank-UVo, ĉar postrestas en mia poŝo nur kurioza flava plasta diskopeco. Stranga kiel tri-stela monero ! Post eta esploro de la loko, komenciĝas la vera kerno de l’semajno, amiki kaj amikiĝi (kaj eĉ pli se emo !). La amikoj sufiĉe afablas por ne rakonti al mi ĉion, kion mi maltrafis ĝis nun pro mia malfruo. Laŭdire, FESTO atendis min por fariĝi ankoraŭ pli mojosa... Kia ŝerco ! La programo anoncas multajn eventojn ja ege mojosaj... Inter aliaj ludoj, babiladoj, vizitoj...

Kaj ekskursoj al bierfabriko, Matriĥto, la “trilanda” punkto, ktp. Eblis al mi esplori, krom la urbeton Kelmis, ankaŭ la ĉefurbon de la germanlingva komunumo “Eupen”. Beleta urbo, kies trezorojn

kaj detalojn nia ĉiĉerono montras. Tie, ni pli akre konatiĝas kun la foli-pasto de l’ belga administra strukturo. Federacia nivelo, regionoj, lingvaj komunumoj, provincoj, kantonoj, municipoj. Simpleco mem ! Se temi pri administraj kukoj, la belga “tompuzo” respondas al la franca “mille-feuille”. Parolante pri kukoj, ni vizitas ankaŭ la ĉokoladfabrikon Jacques. Tial ke ne nur en Svislando gustumiĝas ĉokolado. Laŭ miaj kliŝoj, Belgio pli famas pro siaj frititaj terpomfingroj. Nepris, ke ni manĝis “fritojn”. Je la 4-a matene, meze de la granda kuirejo, aro da malsatuloj freneze senŝeligas terpomojn kaj tranĉas bastonetojn. Omar tutbone fritas ilin oraj. Kia orgio ! Pardonpeton al la fruaj birdoj, kiuj devos lavi niajn grasajn ŝprucaĵojn antaŭ ol aprezi la matenmanĝon.



Tre atenditaj momentoj de la programo, la koncertoj. Dum mia tro mallonga ĉeesto, malkovras mi vivantan muzikon en Esperanto... kaj en la franca. Je la esperanta flanko, kantis multajn i.a. Nikolin’, Kimo, Kajto, Ĵomart’ kaj Nataŝa, Jonny M., Kapriol’ kaj mi forgesas la nomojn – pardonu. Je la franclingva flanko Gaëtano. Nomo kvazaŭ esperanta, sed fakte tute belga. La kantisto kaj lia basgitaristo esprimas grandan intereson por la internacia lingvo, sed fariĝas iom frustrataj pro la lingva barilo dum la koncerto. La kantotekstoj tre gravas al Gaëtano kaj ni sentas, ke mankas al li io por komuniki sian entuziasmon inter la kanzonoj. Per kubuto, mi signas al mia sidnajbarino, Céline. Spit’ ! Ni kune alpaŝas sur scene-



jon por helpi Gaëtanon traduki. Tute certe mia unua fojo en esperantorenkontiĝo iĝas mia unua sperto kiel interpretisto. Kia ĝojiga fuŝaĵo tio estas !

Gaëtano malkovras la gajegan postkoncertan etoson. Samtempe kiel mi. Sed mi pli bone ol li rezistas la alkoholan sturmon ! Meze de la nokto, nia brusela kantisto vidiĝas meze de la dancejo koksolulanta, “varma kiel fritbudo” laŭ l’ belga diro. Duon-nuda. Eĉ pli ol duon-nuda, fakte. Restis nur la kalsono, se mi bone memoras. Nu, nu... Ĉu mi vere volas rememori tion ?

Rememoru ni pli volonte tiun gravegan eventeton, la paradon ! Ĉar ni ja paradis en la stratoj de Kelmis. Verdaj flagoj, verda trombono de Céline (por sonigi La Espero, tutnature, ne La Cucaracha !) kaj vere ĝoja humoro. Alveno al la loka muzeo. Muzeo pri la iama zinkminejo kaj Neŭtrala Moresneto. Ĉiuj ni revivigis la tiel apartan historion de tiu malgranda teritorio. Tiu eteta terpeco koncentras riĉan kulturon. Tio aŭdiĝas ekzemple simple en la paroloj de la homoj, kiuj parolas ĝenerale la lokan ripuaran dialekton, plus la (oficialan) germanan kaj mastras la francan kaj la nederlandan. Lernejo aldonas la anglan. Konsekvence, nia muzegvidisto tre klare komprenas la demandojn en Esperanto, kvankam ŝi neniam lernis la internacian lingvon. Tiu sperto tanĝas strangan kulminon.

Tro frue finiĝas mia restado en Belgujo. De tiam, mi sopiras al nova Esperantorenkontiĝo. “Ĉu vi pli bone komprenas, kial la lastaj du literoj de FESTO signifas terure organizita?” Ne ! Tute ne. Mi preskaŭ neniam konsciis, ke ĉio funkcias improvize.

**Silĉjo**

*PS : Tompuzo (nederlande tompoes aŭ tompouce) similas al la franca kuko mille-feuilles (“millefeuille”) kun iom da kukaĵkremo inter tavoloj de foliigita pasto. Bonan apetiton !*

# Wahdah, Hurriyah, Ishtirakiyah

## Unueco, Libereco kaj Socialismo

## Unité, Liberté, Socialisme

**F**oje oni ĵetis inter nin knabon, kiu aspektis en mizera stato. Videble li estis postvivanto de torturo. Dum du tagoj li ne kapablis paroli al ni. Kio okazis al li ?

Li estis helpisto de bus-ŝoforo, kiu deĵoris apud dezerto. Lia ĉefo havis bedŭenan amikon. En petola malstreĉa horo, la ŝoforo Karim demandis al sia bedŭena amiko Abu-Nasir klarigi pri 'enigmo' jena : « Kiu estas la loko, kiu taŭgas al jena Trio : Unueco, Libereco kaj Socialismo (tio estas la politika Trio-devizo de la Baath-partio). Unueco rilate al iu loko, kien oni rajtas sole eniri ; Libereco, ĉar temas pri tia loko, kie oni povas tutlibere furzi ; kaj Socialismo, ĉar tiun lokon ĉiuj rajtas uzi laŭvice ? » La bedŭeno Abu-Nasir iom kontemplis kaj respondis « Karim, tio estas tute nekonata al ni en la vasta dezerto, certe tio devas esti iu urba afero ĉe vi la popolo de la « truo » (necesejo) ! ».

La anekdoteto plaĉis al Hasan, la helpisto, kiun bedaŭrinde li ŝatis rakonti al sia amiko en apuda kafejo. La ĉiam-atenta inform-policanaro kompreneble, krom okuloj, ankaŭ havas orelojn ĉie. La ŝoforo forkuris en alian urbon. Abu-Nasir, la bedŭeno, rajdis sur sian kamelon kaj malaperis en la dezerto, tamen la bedaŭrinda Hasan devis esti la viktimo de tiu danĝera humuraĵo.

Cetere, ni trovis per tio en la malliberejo novan ŝiboleton : ni komencis saluti nin reciproke per levo de tri fingroj. Kiam la gardistoj rimarkis tiun 'strangan' movon, ni asertis ke tio temis pri Unueco, Libereco kaj Socialismo- la devizo de la la Partio ! Policianoj mokridetis pro nia « fideleco » al tiu Parti-slogano.

*Teksaĵo de rememoroj el malliberejo kun personaj vidpunktoj pri nia mondo kaj precipe pri Irako, la devenlando de la aŭtoro.*

**U**n jour on jeta parmi nous un garçon qui avait l'air vraiment mal en point. Il avait manifestement survécu à la torture. Pendant deux jours, il fut incapable de nous parler. Que lui était-il arrivé ?

Il était assistant d'un chauffeur de car qui effectuait son service au bord du désert. Son patron avait un ami bédouin. Lors d'un moment de détente propice à la plaisanterie, Karim, le chauffeur, demanda à son ami bédouin Abou Nassir de résoudre l'énigme suivante :


« Quel est l'endroit qui correspond au triptyque suivant : Unité, Liberté, Socialisme ? (Il s'agit de la devise politique du parti Baas) : Unité pour un lieu où l'on a le droit d'entrer seul ; Liberté parce que c'est un endroit où l'on est libre de péter tant qu'on veut ; et Socialisme car tout le monde a le droit d'utiliser ce lieu à son tour. »

Le bédouin Abou Nassir réfléchit un instant et répondit :

« Karim, c'est un lieu qui nous est tout à fait inconnu dans le vaste désert, ce doit être un truc qu'on trouve dans les villes, chez vous le peuple du « trou » (les waters) ! »

L'anecdote plut à Hassan, l'assistant, qui s'empressa, pour son malheur, de la raconter à son ami dans un café voisin. La police politique, toujours aux aguets, a évidemment non seulement des yeux, mais aussi des oreilles partout. Le chauffeur s'était enfui vers une autre ville. Abou Nassir, le bédouin, avait disparu dans le désert sur son dromadaire et c'est le pauvre Hassan qui se retrouva victime de cette dangereuse blague.

D'ailleurs, cela nous inspira un nouveau signe de ralliement dans la prison : nous nous mîmes à nous saluer en levant trois doigts. Quand les gardiens remarquèrent ce geste « bizarre », nous affirmâmes qu'il symbolisait Unité, Liberté, Socialisme - la devise du Parti ! Les policiers sourirent ironiquement de notre « fidélité » à ce slogan du Parti...



*Extrait du Taglibro de malliberulo (Journal d'un prisonnier). Hussain Mohammed Al-Amily, Esperanto por Monda Interparolado, p.30, traduit en français par Yannick et Janine Dumoulin.*

*Souvenirs de prison de l'auteur, avec son point de vue personnel sur le monde et principalement sur l'Irak, son pays d'origine.*

## Brasensa Balado en Saint-Brieuc

**E**n publika kantarango dimanĉon la 8<sup>am</sup> de septembro 2013, Esperanto estis la sola fremda lingvo esprimiĝinta dum posttagmeza kantado de kaj memore al Georges Brassens.

Armor-Esperanto decidis aliĝi tiun publikan kantoprezenton kaj sep membroj provkantis kun gitaristo por prezenti al la publiko tri kantojn, *Povra Marteno*, *La geamantoj sur la verda benk'*, *En akvo de la klara fonto*.

Tiu aranĝo, ĉiun jaron alterne organizata ĉu de Rennes [ren] ĉu de Saint-Brieuc [san-brie], kunigis pli ol 200 gekantis-tojn en pli ol 80 kantgrupoj aliĝintaj. La celo estas nur kanti kanzonojn de G. Brassens, konatajn aŭ ne.

La organizantoj preparis kvar sonekipitajn scenejojn kun ĉeesto de teknikistoj tra la malnovaj kvartaloj de la urbo; samtempe, sole aŭ grupe, la kanzonoj invadis la tutan urbon. La publiko vagadis de scenejo al scenejo.



Ni konsciis ke ni vekas la scivolemon de la publiko; dume esperantistino disdonis foliojn de tradukaĵoj kun informoj pri Esperanto. Do, eblas plurmaniere vidigi Esperanton.

Estis agrabla kaj senpaga momento « sen pluvombre! » ni kantis sur la granda strato! ».

Raportis Franjo

## Cocteau kaj Camus en Esperanto

**O**ni lastatempe celebris tiujn du famajn francajn verkistojn. La 11a de oktobro estis la kvindeka datreveno de la morto de Jean Cocteau. En Esperanto aperis liaj verkoj *La homa voĉo/La bela indifereculo*, en traduko de Roger Bernard kaj *La Fatomaŝino*, tradukita de Georges Lagrange.

La 7a de novembro estis la centa datreveno de la naskiĝo de Albert Camus.

La faman romanon *La Fremdulo* tradukis M. Duc Goninaz. *La Justuloj* siatempo estis surscenejigita de TESPAs, tamen la teatraĵo, tradukita de Georges Lagrange, ne estas ĝis nun eldonita.

Kaj jen opinio de leganto Bernard Behra:

« La Fremdulo, de Albert Camus, tradukita el la franca, estas libro, kiun mi aĉetis en librobokantejo. Ĝi mal-

bone odoris kaj perdis siajn foliojn pro malbona broŝurado. Mi tamen legis ĝin antaŭ pli ol ok jaroj en Esperanto. Strange!

Esperanto malkovrigis al mi majstron kaj ĉefverkon de la franca literaturo. Neniam mi estus leginta ĝin en franca, ĉar Camus estis por mi en listo de la verkistoj, kiuj naskiĝis kaj skribis nur por tedi kaj suferigi la lernantojn en liceoj. Mi nenion sciis pri Camus.

*La Fremdulo* faris gravan impreson al mi. La frazoj estis kiel pafoj. Malfacila etoso. Ĉio en la rakonto montras la ĉeeston de la absurdo en ĉia aspekto de la vivo. Fakte ĝi ne estas libro kiu kare-


sas aŭ konsolas. Mi ne ŝatis la rakonton, sed ankoraŭ nun, malgraŭ la jaroj, mi restas en miaj sentoj, ke tiu libro estas grava verko de granda verkisto kun brilega stilo.

Mi nur fine de la lasta jaro malkovris,

ke Camus estas filozofo por la nuna tempo, danke al libro de Michel Onfray *L'Ordre Libertaire, La Vie Philosophique d'Albert Camus (La Liberecana Ordo, La Filozofia Vivo de Albert Camus)*. Nun mi posedas ĉiujn verkojn de Camus en la

franca (mi bedaŭras ke nenio alia aperis de Camus en Esperanto) kaj faris el tiu verkisto, unu el miaj filozofoj. Lia ĉefa filozofia demando estas *kiel kondukti?* Tiu demando jam estas en filigrano en *La Fremdulo*. »

Bernard Behra kaj Claude Nourmont





## La legisto

**M**i ŝategas paroli pri libro, kiun Jean-Luc Tortel tradukis. Temas pri *Der Vorleser*, de Bernhard Schlink, (en la franca *Le Liseur*, esperante *La legisto*).

Vidu [http://fr.wikipedia.org/wiki/Le\\_Liseur](http://fr.wikipedia.org/wiki/Le_Liseur)

Tiu libro estas bona ilo por pridemandi sin kaj pensi pri etikaj aferoj.

Oni eltiris bonegan filmon *The Reader*. Vi trovos ĝin en lumdisco (DVD).

La lastan fojon, kiam mi rete skribis pri tiu libro, tuj poste Roberto K., hazarde, vidis aŭdiŝon pri la filmo apud kinejo, grumblis pri la uson-angla titolo por

filmo en la franca kaj « nekreble! mi ĵus legis pri *Le Liseur* », pensis Roberto, « Jes, tio estas la filmo eltirita de la libro, pri kiu Bernardo skribis ! ».

Tuj kun sia edzino Roberto iris spekti la filmon kaj lasis forflui en la aŭtomobilo la ĵus aĉetitan fromaĝon (*Menschterkaas*). Roberto vere ŝatis. Ne la forfluo de la fromaĝo, sed la filmon. Ĉu ne Roberto ? Do mia konsilo, ne aĉetu fromaĝon, sed tuj la libron *La*



*legisto*. Ĉesu legi la libron, kiun vi nun legas kaj tuj legu *La legisto-n*.

Alia konsilo, tute ne legu la komentojn pri la libro kaj la filmo, antaŭ ol legi/vidi ilin, vi iros de surprizo al surprizo. Do forviŝu la ĉi-supran vikipedian ligan.

Bernard Behra

*Legisto, La*. Bernhard Schlink. Tradukis J.-L. Tortel. Sezonoj. Kaliningrado. 2013.

## En préparation du congrès mondial en Argentine

«**T**ango de la Amo » tel est le titre en espéranto de cet air de tango présenté en vidéo.

La musique est de Gilbert DRIGON, les paroles de Lorenzo TOMEZZOLI. Au chant, Mélanie PRIN, une très belle voix, une prononciation très claire... À écouter sans modération !

<http://www.youtube.com/watch?v=4hocwNvYrPM&feature=share>  
(info : Jacques Baratié)



## Ode à Samarcande



**L**ancement le 19 octobre à Samarcande (Ouzbékistan) d'un livre de poèmes de la poétesse russe Irina Alekseeva, lors d'une

soirée de gala à laquelle ont participé les plus hautes personnalités du monde culturel ouzbek.

A l'initiative d'Anatole Ionessov, fondateur du Musée de la Paix et grâce à l'espéranto comme langue-pont, 71 traductions de l'*Ode à Samarcande* ont été compilées en 62 langues. On doit la traduction en français à Raymonde et Renée Triolle.

Plus d'info (en russe) sur <http://gouzbe-kistan.uz/cat/marketing/Posvyaschenie-Samarkandyna62ya3ukax>

(info : Renée Triolle)

## Huit ans de voyage autour du monde

**E**spéranto-Ile-de-France a fait venir Bruno Robineau pour une conférence sur ses huit ans de voyage autour du monde. Salle comble, public conquis.

Bruno et Maryvonne Robineau ont tout laissé tomber pour parcourir la planète avec une idée simple : échanger leur travail pour recevoir nourriture et logement et partager le quotidien des familles. Leur but ? Tisser des liens. Dans une conférence de 1h10, ils parlent de la rencontre interculturelle, une aventure intemporelle.

La vidéo est captivante et le débat qui a suivi la projection a été fructueux ; il a permis de connaître d'autres facettes de ce merveilleux tour des hommes.

Commentaire de Caroline à l'issue de la

soirée : « C'est une merveilleuse tranche de vie qui invite à s'ouvrir au monde, à éviter de juger, c'est une leçon de philosophie. De plus je suis enchantée de découvrir l'espéranto. L'idée est géniale de pouvoir se dire qu'en très peu de temps on peut maîtriser une langue. »

« Ils présentent l'espéranto de façon pédagogique. C'est percutant, efficace. Bruno est parmi nos meilleurs ambassadeurs de l'esperanto. Sa vidéo met très bien en valeur l'espéranto et le rôle prépondérant qu'il a eu dans leur odyssée. Un témoignage de cette sorte donne une vision très positive de l'espéranto » déclare une espérantiste. Si vous voulez les inviter, vous serez enchantés.

([www.voyage-tourdu monde.com](http://www.voyage-tourdu monde.com))

## Soĉi, reva urbo ?



**R**usio estas unika lando pro tio, ke ĝi lokiĝas samtempe en Eŭropo kaj Azio, en Okcidento kaj en Oriento. Krome ĝiaj plej nordaj partoj troviĝas en la regionoj kun ĉiamfresta grundo kaj la plej sudaj partoj havas varmegan klimaton kaj kelkaj troviĝas eĉ en la subtropika klimata zono.

Kun Anna kaj mia patrino mi vizitis la urbon Soĉi, kie ripozis mia avino. Tio estis mia dua vojaĝo al tiu ĉi urbo (pasintfoje mi vizitis ĝin en 2002).

### Kurte pri Soĉi

La urbo kaj ĝiaj ĉirkaŭaĵoj havas la subtropikan klimaton, kiun mi menciis antaŭe. Pro tio ekz. palmoj kaj pinoj

samtempe normale kreskas ĉi-regione. La urbo troviĝas parte en la kaŭkazia montaro kaj ĝia suda parto troviĝas ĉe la bordo de Nigra Maro. Pro tio ĝi havas plurajn ripozejojn.

### La strandoj

Ili apenaŭ ekzistas. Plejparto el lokaj turistoj venas al Soĉi kun espero havi eblecon naĝi aŭ akvumiĝi en la maro. Jes, tian eblecon ili do havas, tamen... En la urbo la strandoj estas tre mallarĝaj kaj kovritaj per akraj ŝtonoj, krome abunda rubaĵo

estas kutima afero tie. Necesas menci, ke la strando estas plenplena de la laboristoj el apudaj regionoj, kiuj venis al Soĉi por iom drinki dum ripoztago. Ne miru, ke ili kuŝas sur la malpuraj ŝtonoj inter la rubaĵoj (iuj uzas por tio viŝtukojn, iuj uzas nenion) kun malpli ol

duonmetra distanco unu de la alia. Preskaŭ ĉiuj el ili senĉese fumadas. Apude oni amase kaj aktive vendas malbonkvalitan (sed tamen sufiĉe multekostan) «bieron» kaj «vinon», kiujn la «ripozantoj» kun plezuro drinkas ĉe la marbordo (krome ili foje kunportas vodkon, aĉetitan en la apudaj vendejoj). Apude situas signoj

kaj anonctabuloj, kie oni formale malpermesas apud la marbordo fumi kaj drinki, sed tio neniam ĝenas...

### Vintraj Olimpiaj Ludoj, ktp

21-aj Vintraj Olimpiaj Ludoj okazos ĝuste en Soĉi. Tamen pluraj observantoj konstatas, ke la urbo pretas nek infrastrukture nek

morale. Laŭ niaj subjektivaj spertoj tio fakte estas vero: la prezoj por loĝado kaj manĝado por turistoj estas ege altaj, tamen la kvalito de la servoj estas subnivela; la urbo havas problemon kun la normalaj vojoj kaj publika transporto... Ni kelkfoje aĉetis kafon en la specialaj aŭtomatoj en la stacidomoj de diversaj urboj. Jen la kostoj: Dmitrov (moskva regiono) - 20 rubloj, Peterburgo - 25 rubloj, Moskvo (unu el la plej multekostaj urboj de la mondo, cetere) - 30 rubloj, Soĉi - 45 rubloj! La kafo kaj la firmao, kiu ĝin vendas, estas

la samaj! Ĉu vi imagas ripozlokon, kie oni postulos po 3-5 mil eŭrojn persone por unu semajno en 2-stela hotelo kun aĉa manĝaĵo kaj malpura necesejo, sen transporto kaj sen ajnaj aliaj oportunaĵoj? Se vi volas sperti tion, vizitu Soĉion! :) Ĝuste pro tio plejparto de rusianoj preferas ripozi en Egiptio, Turkio, Grekio, Bulgario, Hispanio... Tio estas multe pli komforta kaj malmultekosta, kompare kun la enlanda «ĉefa» ripozloko...

### Niaj pozitivaj spertoj

La plej pozitiva afero estas ĉirkaŭaĵoj de Soĉi. Ili nuntempe estas sufiĉe sovaĝaj kaj ne tro aktive vizitataj de turistoj. Mi kune kun Anna rifuzis la «oficialajn» ekskursojn kaj pro tio sukcesis viziti multajn mirindajn lokojn. Unue ni piedmarŝis tra la Agura abismo al la monto Aĥun, de kie ni marŝis malsupren al la mara bordo. Ĉi-tage nia piedvojo estis ĉirkaŭ 40 kilometroj. Poste ni vizitis la pitoreskan montaron, kiu situas aliflanke de tiu monto. La lasta nia aventuro estis la vizito de pitoreskaj akvofaletoj, kiuj neniam aperas en turismaj programoj.

(El Ipernity-blogo de Dimi, 21<sup>an</sup> de aŭgusto 2012)

